

IRANA
ESPERANTISTO

سپرنديشان

Kultura sezono-revuo en Esperanto, la persa, la araba kaj la kurda
N-roj: 37, Dua Serio, Printempo 2021

فصلنامه‌ی فرهنگی چندزبانه اسپرانتی، فارسی، کردی و عربی
شماره ۳۷ دوره دوم، بهار ۱۴۰۰



IrEK-8: "Virtuala Mondo, Reala Espero"

اسپرنديشان

Ajman

IRANA ESPERANTISTO

Pajam-e Sabzandiŝan
(Mesaĝo de Verd-ideanoj)
ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO
Kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia
Dua serio, N-ro 37, Printempo 2021

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuajoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuajoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

Ĉia presa aŭ elektronika citado aŭ eldonado de materialoj de IRANA ESPERANTISTO, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciu pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri IRANA ESPERANTISTO aŭ/kaj sendu ciferecan kopion al ni: info@espero.ir.

به نام خداوند جان و خرد

سبزاندیشان

فصلنامه‌ی پژوهشی - فرهنگی دوزبانه‌ی فارسی و اسپرانتو

دوره دوم، شماره سی‌وهفتم، بهار ۱۴۰۰
شماره استاندارد بین‌المللی (ISSN):
۱۷۲۸-۶۱۷۴

تاریخ انتشار نخستین شماره: پاییز ۱۳۸۱

نقل مطالب مجله با ذکر منبع و ماخذ جایز است و از استفاده کنندگان درخواست می‌شود یک نسخه الکترونیکی یا تصویر از نشریه‌ای را که در آن مطلبی به نقل از این مجله درج شده است به نشانی اینترنتی مجله ارسال کنند.

مسئولیت مطالب مندرج در این مجله برعهده‌ی نویسندگان آن می‌باشد.

گرافیک و حروفچینی: سبزاندیشان

نشانی‌ها:

پایگاه اینترنتی: www.espero.ir

پست الکترونیک: info@espero.ir

همکاران تحریریه این شماره:

- * رولان پلاتو
- * سروش محمدزاده
- * شلر کریمی
- * امیر فکری
- * کیهان صیادپور
- * نازی صولت
- * حمزه شفیعی
- * سیمین عمرانی
- * بهجت ممدوحی

Mallongigoj uzitaj en ĉi tiu numero

ILEK: Irana Literatura Esperanto Konkurso
IrEA: Irana Esperanto-Asocio
IrEJO: Irana Esperantista Junulara Organizo
IrEK: Irana Esperanto-Kongreso
IrLEI: Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj
UK: Universala Kongreso

Irana Esperantisto
akceptas anoncojn.

مجله سبزاندیشان آماده پذیرش آگهی می‌باشد.

Kontribuantoj ĉi-numere:

- * Roland Platteau
- * Surush Mohammadzadeh
- * Shler Karimi
- * Keyhan Sayadpour
- * Nazi Solat
- * Hamzeh Shafiee
- * Amir Fekri
- * Simin Emrani
- * Behĝat Mamduhi

Kovrila Paĝo:

La 8-a IrEK

Desegnanto:

Ajman Grupo

طرح رو و پشت جلد:

ویژه هشتمین همایش اسپرانتوی ایران

طرح از:
گروه آژمان



En ĉi tiu numero:

در این شماره:

- 4 Antaŭ ĉio..
- 5 Novaĵoj
- 6 Raporto pri IrEK-8
Surush Mohammadzadeh
- 10 Mesaĝoj al IrEK-8
- 12 Prezento: Prof. Alinagi Maŝajehi
Behĝat Mamduhi
- 15 Vi estas Renato Corsetti!
Poemo de Keyhan Sayadpour por prof. R. Corsetti
- 16 Pierotinoj kaj Pierotoj
Tradukis: Roland Platteau
- 18 Veturoj kaj Memoraĵoj (2)
Nazi Solat
- 24 30 Karakterizaĵoj de nelegemuloj
Tradukis: Simin Emrani
- 25 Diversaĵoj
Amir Fekri
- 26 Malkuraĝega Postvivanto
A. Fekri
- 28 Aventuroj de Pioniro (14)
Tradukis al la persa: A. Fekri
- 30 Intervjuo
Intervjuo kun d-ro Hamed Sufi
- 32 Paĝoj en la Kurda Lingvo
Shler Karimi
- 36 Paĝoj en la Araba Lingvo
Keyhan Sayadpour



- 4 قبل از هر چیز ...
- 5 اخبار
- 6 گزارش هشتمین همایش اسپرانتوی ایران
سروش محمدزاده
- 10 پیام‌های ارسالی برای هشتمین همایش اسپرانتوی ایران
- 12 معرفی پروفسور علینقی مشایخی
بهجت ممدوحی
- 15 شعری به اسپرانتو به مناسبت ۸۰مین سالگرد تولد پروفسور رناتو کورستی - دکتر کیهان صیادپور
- 16 پیروتین‌ها و پیروت‌ها
شعری با ترجمه ی رولان پلاتو
- 18 سفرها و خاطره‌ها (۲)
نازی صولت
- 24 سی ویژگی کتاب‌نخوان‌ها
ترجمه به اسپرانتو: سیمین عمرانی
- 25 گوناگون
امیر فکری
- 26 بازمانده ترسو
امیر فکری
- 28 ماجراهای یک پیشتاز (۱۴)
ترجمه: امیر فکری
- 30 مصاحبه
گپ و گفت با دکتر حامد صوفی
- 32 صفحات کردی
شهر کریمی
- 36 صفحات عربی
کیهان صیادپور

Antaŭ ĉio...

Sendube la movado en Irano spertas pli viglan kaj pli aktivan agadon post la pandemia krizo. Fakte la virtualiĝo de niaj kunvenoj kaj kongresoj kaŭzis ke la agadoj de IrEA havu bonan eĥon tutmonde kaj tio donis kuraĝon por pli da aktivado. La 8-a Irana Esperanto-Kongreso estis vaste bonvenigata pere de eksterlandanoj, kiuj trovis en la programo abundon da prelegoj kaj distraj programeroj. Nun estas tempo por ke ni donu pli da fokuso al internaj agadoj cele al varbado de novaj iranaj aktivuloj. Ĝuste por realigi tiun celon, ni komencis dediĉi paĝojn de la revuo al minoritataj lingvoj en Irano kaj poste aranĝis programerojn en tiuj lingvoj dum la IrEK-8. Ni daŭrigas tiun ĉi novan iniciaton kaj esperas, ke baldaŭ tio rezulto-donos al aperigo de novaj esperantistoj en ĉiuj partoj de nia lando.

Pri la ĵus pasinta IrEK-8 vi povas legi raportojn kaj mesaĝojn en tiu ĉi numero. Sed restas ankoraŭ multaj artikoloj kaj mesaĝoj, kiuj aperos en la venonta numero. Ni invitas vin legi la reporton pri la kongreso ankaŭ en la maja numero de la revuo "esperanto".

Ĝuu la printempan numeron de la "Irana Esperantisto".

Via, Hamzeh Shafiee

Ĉi tiu artikolo...

Heshtemin hemayesh asperantoyi iran ba mofaqiyat bregzar shod. Be hemin dailil तरह روی جلد و نیز چندین صفحه از مجله به این موضوع اختصاص یافته است. سلامها و پیامهای متعددی نیز برای همایش دریافت شده است که به دلیل حجم زیاد آنها، منتخبی از آنها در این شماره و بخش برگزیده دیگری نیز در شماره بعدی منتشر خواهد شد. در سایر صفحات مجله قسمت دوم و پایانی خاطرات جالب و خواندنی سفر خانم مهندس صولت به کنگره جهانی اسپرانتو در لیتوانی، مقاله‌ای درباره معرفی پروفسور علینقی مشایخی، دکترای مدیریت از ام‌آی‌تی و استاد برجسته دانشگاه صنعتی شریف با ترجمه‌ی خانم ممدوحی، مصاحبه با دکتر صوفی، و نیز صفحاتی به زبان‌های کردی و عربی را در کنار مطالب کوتاه خبری و ادبی دیگر مشاهده می‌نمایید.

و اما در پایان این سخن کوتاه، ضروری می‌دانم که یک بار دیگر از تمامی خوانندگان این نشریه و اعضای انجمن درخواست کنم که برای پیشبرد و تسریع در انجام فعالیت‌ها از انجام هرگونه همکاری و کمکی که از دستشان برمی‌آید دریغ نکنند. دوستان عزیز باور داشته باشند که تنها با همکاری دسته‌جمعی همگانی می‌توانیم به آینده اسپرانتو در ایران امیدواری زیادی داشته باشیم.

ارادتمند، حمزه شفیعی

Salutmesaĝo de d-ro Keyhan Sayadpour, la prezidanto de IrEA, al la 8-a Irana Esperanto-Kongreso

Karaj! Pasis unu jaro de kiam ni gustumis por la unua fojo la vinon de virtualeco. Afero kiu apud masko, lavado, kaj socia distanco, protektis esperantistojn kontraŭ la malica viruso. Kaj poste venis pliaj: VEKI, IMEK, MondaFest, VK, IKIKO, KAEST, kaj tiel plu. Kaj nun ni komencas nian 8-an kongreson kaj la duan virtualan kun reala espero pri finvenkado de ne nur nia kara lingvo, sed ankaŭ de la bataloj kontraŭ tiu viruso.

Niaj pasintaj kongresoj estis nur Esperant-lingvaj. Ni plivastigis la terenon kaj ĉijare ni havos prelegojn ankaŭ en la persa kaj kelkaj minoritataj lingvoj de Irano. Mi dankas vin, kontribuantoj kaj partoprenantoj. Por nia celo, virtuala mondo estas reala espero.



پنجاه‌وسومین «روز آزاد» «سازمان جهانی اسپرانتو» و «سازمان جهانی جوانان اسپرانتودان» بار دیگر به صورت مجازی

بنا به سنت مرسوم، مقر «سازمان جهانی اسپرانتو» (دارای روابط رسمی با سازمان ملل و یونسکو) همه ساله دو بار برای بازدید عموم گشوده می‌شود. با بروز پاندمی، انجام این امر میسر نشد. اما در عوض این مراسم به صورت مجازی برنامه‌ریزی و اجرا گردید.

پنجاه‌وسومین «روز آزاد» (Malferma Tago) امسال تنها چند روز بعد از هشتمین کنگره اسپرانتوی ایران و با میزبانی سازمان اسپرانتوی ایران در محیط زوم برگزار شد. در این برنامه که روز شنبه ۲۸ فروردین از ساعت ۱۷:۳۰ به وقت ایران آغاز شد و به مدت ۷ ساعت ادامه داشت، علاوه بر سخنرانی‌های جالب و مهم، برنامه‌های متنوع دیگری نظیر معرفی کنگره‌های آینده، رادیوهای اسپرانتوزبان و نیز جدیدترین ویدیوموزیک‌های تولید شده برای حاضرین در محیط زوم و نیز بینندگان در یوتیوب ارائه شد.


چنانچه مشاهده آنلاین این برنامه را از دست داده‌اید، می‌توانید تمامی این هفت ساعت برنامه را در کانال یوتیوب «سازمان جهانی اسپرانتو» به آدرس زیر مشاهده نمایید.

<https://youtu.be/et1SODr7i7I>



انتشار ماهنامه «اسپرانتوی ما» در پاکستان

«اسپرانتوی ما» عنوان ماهنامه جدیدی است که از ابتدای سال جاری میلادی توسط «مجمع اسپرانتوی مولتان» در شهر مولتان پاکستان منتشر می‌شود. تاکنون چهار شماره از این نشریه منتشر شده است. تصویر زیر مربوط به روی جلد چهارمین شماره‌ی این مجله است که به مناسبت روز جهانی کارگر به چندین زبان به آن اشاره شده است. همچنین در این شماره از نشریه مقاله‌ای از مجله «پیام سبزاندیشان» که از اسپرانتو به زبان اردو ترجمه شده است به چشم می‌خورد.



هزینه اشتراک سالانه نسخه PDF مجله‌ی «اسپرانتوی ما» مبلغ ۳ یورو می‌باشد که از طریق حساب «مجمع اسپرانتوی مولتان» نزد سازمان جهانی اسپرانتو (mero-t) قابل پرداخت است. علاقه‌مندان به کسب اطلاعات بیشتر می‌توانند با آدرس ایمیل زیر مکاتبه نمایند.

saluton123@yahoo.com

مصاحبه رادیو لهستان با دست‌اندرکاران برگزاری همایش اسپرانتوی ایران

تنها یک روز پس از پایان هشتمین همایش اسپرانتوی ایران، مجری سرشناس بخش اسپرانتوی رادیو ورشو در لهستان طی یک جلسه از قبل هماهنگ‌شده، مصاحبه‌ای با دست‌اندرکاران برگزاری این همایش ترتیب داد تا درباره این همایش و همچنین فعالیت‌های اسپرانتو در ایران به شنوندگان این رادیو اطلاع‌رسانی نماید. شما را به شنیدن این مصاحبه از طریق لینک زیر دعوت می‌کنیم:

http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-13-04-2021/

Neforgesinda 4-taga Irana virtuala kongreso

Surush Mohammadzadeh



De la 8a ĝis 11a de aprilo okazis la 8a Irana Esperanto-Kongreso nome IrEK-8, kion organizis Irana Esperanto-Asocio (IrEA). La kunveno fariĝis pli riĉa per la kunlaboro de Stefan McGill, kiu organizis la 72an AMO-seminaron kadre de la Kongreso – ĝuste kiel okazis ankaŭ en la IrEK-7 en la pasintjara aprilo. Pro la pandemio la kongreso okazis duafoje virtuale kun ĉeftemo “Virtuala Mondo, Reala Espero”. En la kongreso partoprenis 131 personoj tra la tuta mondo (el 37 landoj kaj 5 kontinentoj!).

La planoj venis tra pensado de kvar personoj kiel organizantoj: inĝ. Ahmad Mamduhi, inĝ. Hamzeh Shafiee, d-ro Keyhan Sayadpour kaj s-ro Surush Mohammadzadeh. La programerojn anoncadis kaj gvidis tra la tuta kongreso inĝ. Ahmad Mamduhi, eminenta irana esperantisto senĉese kaj senlace!

La komenca tago: multaj salutmesaĝoj

Ĉe la komenco diversaj asocioj, organizaĵoj kaj personoj salut-mesaĝis la kongreson ĉu vive kaj ĉeeste, ĉu vide-registrite kaj ĉu skribe. Inter la salutantoj troviĝis d-ro Keyhan Sayadpour, la IrEA-prezidanto, d-ro Duncan Charters, la

UEA-prezidanto, s-ino Chen Ji, la direktorino de ĈEL (Ĉina E-Ligo), d-ro Sean O Riain, la prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio, kaj s-ro Tianyi Wang (Ĉielismo), la prezidanto de IKEF. Poste komenciĝis jaraj raportoj de IrEA, IrEJo (Irana Esperantista Junulara Asocio), IrLEI (Irana sekcio de ILEI), kaj diversaj prelegoj plejparte en Esperanto kaj kelkaj en la persa, araba, azera kaj kurda lingvoj.

Amaso da prelegoj en 5 lingvoj!

Dum 4 Tagoj po 12 horoj ĉiutage okazis ĉ. 40 prelegoj per pli ol 30 personoj. La prelegoj havis tre diversajn temojn: movadajn, edukajn, artajn, natur-sciencajn, nutrajn, instruajn ktp.

Interesa punkto estis, ke unuafoje dum la IrEKoj okazis ankaŭ kelkaj prelegoj en iranaj diversaj lingvoj nome: la persa, kurda, araba kaj azera (turka) ĉefe por prezentado de Esperanto por tiulingvanoj.

Donaco de MONATO al la partoprenantoj

Alia surpriza ago por la kongreso estis la malavara donacado de la venonta (la maja) numero de la prestiĝa “Internacia Magazino Sendependa”, MONATO, al ĉiuj partoprenantoj de la kongreso, kiuj aliĝis pere de la IrEA-retejo.



Jogo, por ke ni ankaŭ korpe trejniĝu!

Alia unika programo estis en la komenco de la lasta tago, kiam ni havis instruon de jogo per Karol, pola esperantisto, kiu nutempe loĝas en Tajvano. Per liaj movoj, kiuj nomiĝis asanoj en jogo, la partoprenantoj movis la korpon kaj tiel povis iom vigliĝi kaj esti pli preparitaj por alia longa tago de la kongreso, kiu daŭris eĉ pli ol 12 horojn – kalkulante ankaŭ la allogan kaj fintempan koncerton de la kara Kajto! Estas menciinde ke ankaŭ eksteriranaj irananoj helpis al la buntigado de la kongreso, pleje s-ro Reza Kheirkhah, kiu nun loĝas en Tajvano, kaj montris vive la E-Centron de Tajvano, kaj prelegis pri siaj vojaĝoj al 22 landoj per/por Esperanto, kaj - kiel en la pasintjara IrEK - prezentis jogiston, pri kiu supre vi jam legis.

Granda surprizo de Kajto ĉe la fino

Ĉe la fino de la kongreso, okazis granda surprizo pere de Kajto, tre konata kant-grupo, kiu koncertis per belaj novaj kaj malnovaj kantoj dum pli ol unu horo. Ili lasis ege plaĉan kaj karan memorajon por ĉiuj. Cetere, la nombro de la partoprenantoj dum la koncerto estis la rekorda dum la tuta kongreso kun ĉeesto de pli ol 50 personoj samtempe en Zoom-ĉambro. Dumkoncerte ili uzis diversajn muzikilojn por siaj bele variaj kantoj. La duopa Kajto verdire ĉiam-juna kaj ĉiam-vigla estigis tute gajan kaj senlacigan tempon por ĉiuj kongresanoj, el kiuj, iuj dum la pasintaj 4 tagoj,

ĉiutage ĉeestis la kongreson entute dum preskaŭ ĉ. 50 horojn!

ZOOM kaj Jutubo samtempe!

Krom ZOOM la kunveno estis elsendata ankaŭ pere de la Jutub-kanalo de UEAviva, kiu kaŭzis plialtiĝon de la nombro de la spektantoj averaĝe ĉ. 160% dum la 4-taga kunveno. Krome, ĝis nun, t.e. la 7a de majo 2021, la registraĵoj de la kongreso en la kanalo estas spektita ĉ. 2000 fojojn entute. En la fino la kongreso (la 11an de aprilo), multaj partoprenantoj esprimis sian kontenton pri la kongreso kaj sian entuziasmon por la venontjara IrEK-9! Ĉe la babilejo de ZOOM dum la tuta tempo de la kongreso ĉiuj rajtis esprimi siajn komentojn kaj/aŭ demandojn pri/al la prelegantoj. Espereble IrEK-9 okazos hibride – t.e. kaj ĉeeste, kaj rete – ja se ni ĉiuj, la tuta homaro, evitos riskajn kondutojn rilate al la kuranta pandemio.

Jen ligiloj por spekti la kompletajn registraĵojn de ĉiuj 4 tagoj de la kongreso:

1. Ligilo por la 1-a tago, ĵaŭde, la 8-an de aprilo: <https://youtu.be/75UhgXfy4g4>
 2. Ligilo por la 2-a tago, vendrede, la 9-an de aprilo: <https://youtu.be/7PwY6f1wMto>
 3. Ligilo por la 3-a tago, sabate, la 10-an de aprilo: <https://youtu.be/RRM91QzRLLo>
 4. Ligilo por la 4-a tago, dimanĉe, la 11-an de aprilo: <https://youtu.be/XGODyp1s4AY>
- Kaj jen ligilo por la koncerto de Kajto: <https://youtu.be/MuVPxNr4Dos>

هشتمین همایش سالانه اسپرانتو در ایران


- چهار روز فراموش‌نشده در همایش مجازی با ویژگی‌های منحصر به فرد
- ۱۳۱ شرکت‌کننده از ۳۷ کشور
- ۴۰ سخنرانی توسط بیش از سی سخنران
- اهدای رایگان آخرین شماره مجله «موناتو» به شرکت‌کنندگان در همایش
- برنامه‌های متنوع کارگاه اورینگامی، یوگا و موسیقی در کنار برنامه‌های سخنرانی

از ۱۹ تا ۲۲ فروردین امسال هشتمین همایش سالانه اسپرانتوی ایران (IrEK-8) به همت انجمن اسپرانتوی ایران برگزار شد. این همایش با همراهی هفتاد و دومین سمینار پرورش فعالان اسپرانتو (AMO-Seminario) که توسط استفان مک‌گیل اجرا گردید به دستاوردی بزرگ برای فعالیت‌های اسپرانتو در ایران و ارتقای آن در انظار اسپرانتودانان جهان مبدل شد. هشتمین همایش اسپرانتوی ایران همچون همایش قبلی (IrEK-7) به دلیل شرایط پاندمی به صورت آنلاین و مجازی برگزار شد. موضوع اصلی همایش امسال «دنیای مجازی، امید واقعی» بود که بارها توسط سخنرانان و شرکت‌کنندگان همایش مورد اشاره قرار گرفت و در خصوص آن مطالب زیادی ارائه شد. در این همایش ۱۳۱ نفر از ۳۷ کشور از پنج قاره جهان با ارسال فرم ثبت‌نام شرکت نمودند.

در همایش امسال انجمن‌ها، سازمان‌ها و افراد متعددی از طریق حضور در این همایش مجازی و یا با ارسال پیام‌های متنی و تصویری سلام‌های خود را به شرکت‌کنندگان ارسال نموده و همایشی پر بار و موفق آرزو نمودند.

در برنامه‌های امسال علاوه بر سخنرانی به زبان اسپرانتو، برنامه‌های سخنرانی به زبان‌های فارسی، کردی، عربی و آذری نیز گنجانده شده بود که به عنوان یک ابتکار جالب مورد توجه شرکت‌کنندگان قرار گرفت. موضوع این سخنرانی‌ها عمدتاً در رابطه با معرفی زبان اسپرانتو برای غیراسپرانتودانان بود.

از دیگر ویژگی‌های منحصر به فرد و جالب همایش امسال، اهدای رایگان آخرین شماره نشریه معتبر بین‌المللی «موناتو» به شرکت‌کنندگان بود که به



شرکت‌کنندگان در کارگاه ساخت اورینگامی، در پایان کلاس دست‌ساخته‌های خود را به نمایش می‌گذارند.



میریو گروزان، رییس «اتحادیه جهانی آموزگاران اسپرانتودان» در سخنرانی خود آخرین شماره «نشریه بین‌المللی آموزش» را به حضار نشان می‌دهد.



خانم پروفیسور آرکو، استاد زبان اسپرانتو در دانشگاه نانچینگ، همراه با دانشجویانش از کشور چین برای شرکت‌کنندگان در همایش اسپرانتوی ایران سلام می‌فرستند.



اسپرانتودان سرشناس، پروفیسور فدریکو گوبو، استاد بینابان‌شناسی و اسپرانتوشناسی در دانشگاه آمستردام هلند، برای همایش اسپرانتوی ایران سخنرانی می‌کند.



پروفیسور خوزه آنتونیو ورگارا، از اعضای سابق هیأت رئیسه سازمان جهانی اسپرانتو، به یاد جنگل‌های شمال کشورمان، از درون جنگل پورتومونت شیلی، پیام می‌دهد.

ابتکار ناشر این مجله (اتحادیه اسپرانتوی بلژیک) صورت پذیرفت. همچنین برنامه آموزش یوگا از تایوان نیز در زمره برنامه‌های جالب و پرترفدار همایش بود که با کمک آقای رضاخیرخواه و کارلو، استاد یوگا از تایوان برای شرکت‌کنندگان در همایش اجرا شد. چند برنامه آموزش ساخت اورینگامی نیز توسط خانم لاریسا اوسادچوک، استاد نمایش عروسکی و اورینگامی از فرانسه، حس و حال متفاوتی به همایش بخشید.

تمامی چهار روز برنامه‌های کنگره علاوه بر محیط زوم، به طور مستقیم از کانال یوتیوب سازمان جهانی اسپرانتو نیز پخش گردید و ده‌ها نفر نیز از این طریق به تماشای برنامه‌های همایش پرداختند. شما نیز چنانچه موفق به حضور در کنگره نشده‌اید و یا برنامه‌ای را از دست داده‌اید، می‌توانید از طریق کانال یوتیوب انجمن جهانی اسپرانتو (UEAviva) مشاهده نمایید. در زیر لینک‌های فیلم همایش به تفکیک روزانه برای استفاده علاقه‌مندان آورده شده است:

روز نخست: <https://youtu.be/75UhgXfy4g4>

روز دوم: <https://youtu.be/7PwY6f1wMto>

روز سوم: <https://youtu.be/RRM91QzRLLo>

روز چهارم: <https://youtu.be/XGODyp1s4AY>



پروفیسور پروبال داشگوپتا، رییس اسبق انجمن جهانی اسپرانتو، از کشور هندوستان برای همایش پیام ارسال نمود.

Mesaĝoj al IrEK-8

Antaŭ, dum, kaj post la kongreso, ni ricevis dekojn da mesaĝoj el ĉiuj partoj de la mondo. Sube ni aperigas nur parton de la mesaĝoj por niaj karaj legantoj. En la venonta numero ni aperigos pli da mesaĝoj.

Mi partoprenis kun granda plezuro la antaŭan, la 7-an. Danke al Esperanto mi malkovris Iranon kaj fariĝis porĉiama amiko de ĝi. Ĉio pri Irano min interesas.

Luiz Alberto de Oliveira Coelho / Brazilo

Karaj amikoj mi salutas vin el Ukrainio. KOVIM-19 ne malhelpos al ni amikiĝi per esperanto por mondpaco kaj amikeco.

Olga Bauer / Ukrainio

Mi salutas, kaj gratulas al la teamo, kiu daŭre kaj senlace aranĝas IrEK-on. Mi bondeziras por ĉiuj teamanoj. Sukcesojn.

Adeel Mahmood Butt / Pakistano

Kun ĝojo mi trovis ĉi tiun aranĝon, kiun mi ŝatus partopreni.

Anjo Amika / Hungario

Estus tre agrable al mi renkonti amikojn almenaŭ virtuale. Mi salutas organizantojn.

Teresa Pomorska / Pollando

Elkoran Saluton al la Organizantoj!

Lastjare mi havis ŝancon partopreni en la Irana Esperanto-Kongreso kaj gajnis multajn interesajn, valorajn kaj utilajn informojn. La Organizantoj sindediĉe kaj tre bone oragnizis ĉion laŭ internacia normo.

Ĉijare, mi dankas al vi por via afabla invito kaj esperas ke venonta Kongreso estos plivalora ol la lastjara kaj laŭ la temo certe ĝi estos tre valora kaj utila rilate al la Pandemio.

Mi deziras al vi ege ege sukcesan Kongreson.

NAEEM Muhammad Javaid / Pakistano

Estimataj,

Mi bonkore salutas la organizantojn kaj la partoprenantojn de la 8-a Irana Esperanto-Kongreso dezirante bonan etoson kaj interesajn kontribuojn.

Mi volonte partoprenus en IrEK-8.

Mi havas freŝajn impresojn pri via lando ĵus spektinte polan prihistorian filmon „La vojo de l' espero” (2020) laŭ la projekto de Pola Televido pri transviva (survival) ekspedicio de pola 6-persona grupo laŭ la vojo de Siberio (Rusio) ĝis Italio por memorigi preskaŭ 4-jaran migradon de 120 mil da polaj soldatoj kaj civiluloj kun la Pola Armeo de generalo Władysław ANDERS dum la Dua Mondmilito. Gastama Irano donis helpon al polaj rifuĝintoj evakuitaj el Sovetunio, kiuj sukcesis atingi Iranon trans la Kaspian Maron. En Irano oni organizis centrojn por alvenintoj el la fora Lehistano (en urboj Bandar-e Anzali, Tehrano, Esfahano). Irano estis la pola pordego al libereco. Dum la dua mondmilito la irana popolo, kiu mem estis en malfacila situacio, verkis belan paĝon en la historio de monda humanitarismo. La evakuado de poloj el Sovetunio al Irano komenciĝis en julio 1941 kaj finiĝis en aŭgusto 1942. En du stadioj, estis transportitaj ĉirkaŭ 120.000 homoj, inkluzive de pli ol 78 mil soldatoj kaj 37 mil civiluloj, el kiuj ĉirkaŭ 20.000 estis infanoj. La grupo de ekspedicio vizitis i.a. polan militistan tombejon en Tehrano kaj renkontiĝis kun homoj, kiuj memortenas restadon de polaj rifuĝintoj.

Kun la plej bonaj salutoj el Pollando

Jerzy DRYJA [jeĵi] / eo Georgo

Legionowo [legjonovo] apud Varsovio

Mi dankegas pro tiu grava kongreso. Mi bedaŭras ke mi ne pli frue aŭdis ion pli pri via lando, aŭskultante pri via kongreso nur posttagmeze; nek pri Azio. Ankoraŭ dankon!

Mikaela el Reunio

Saluton al vi, Mi estas nova esperantisto kaj mi feliĉas esti kun vi, mi kaj mia amiko faras programon en Esperanto.

Behnomo Moqaddasi / Irano

Vi estas brilaj homoj kaj inspiro por nia internacia agado.

Fernando Maia Jr. / Brazilo

Estimataj Samideanoj,
Korajn dankojn por via tre peza laboro, kiun mi admiris dum la daŭro de via ege interesa kongreso. Kion oni povas sincere diri? Por mi granda travivaĵo. Ĝi estis mia unua virtuala E-Kongreso. Tre interesaj, pensigaj prelegoj. Vivaj, saĝaj diskutoj. Kaj ĉiam paciencaj partoprenantoj, malgraŭ malgrandaj teknikaj problemoj sendependaj de vi. Koncerto de Kajto, neforgesebla. Mi gratulas al ĉiuj organizantoj de Kongreso. Granda sukceso! Ĝis la venonta jam ne virtuala 9-a E-Kongreso en Irano.

Via pola amiko Kazimir.

Mi dankas vin pro la ideo, la organizado kaj la peno sukcesigi la renkontiĝon.

Vicente Manzano-Arrondo, Viko / Hispanio

... unue mi gratulas vin kaj viajn kolegojn pro la ege bona organizado de la 8-a Irana Esperanto-Kongreso. Mi ne havas ĉiujn bezonatajn rimedojn por zoom, sed mi povis esti spektanto per youtube, kaj mi sukcesis aŭskulti multajn prelegojn. Dankegon! Bonvolu transdoni miajn dankojn ankaŭ al Ahmad (kies retadreson mi ne plu havas), gratulojn al li pro la pacienco, diplomatio, ĝentileco en la "mastrumado" de la etapoj de la prelegaro....Estu kontenta post vera sukceso de via Kongreso! ...

Mara Butan

Deziras similan sukceson kiel la pasintjaron!

Reza Kheirkhah / Tajvano

La lastjara Irana Esperanto-Kongreso restas kaj restos kiel speciala kongreso en mia memoro.

Ĝi estis la unua internacia virtuala evento, kiun mi spertis.

Ekde tiam multo ŝanĝiĝis. Preskaŭ ĉiutage okazas diversaj virtualaj renkontiĝoj tra la mondo.

Ne ŝanĝiĝis la rimarkinda kaj estiminda vigleco de iranaj esperantistoj.

Mi certas, ke ankaŭ la ĉi-jara kongreso kun denove aparte interesa programo kontribuos al pli bona interkompreniĝo de homoj el diversaj mondpartoj.

KIMURA Goro Christoph (Japanujo)

Salutvortoj al Irana Kongreso

De la prezidanto de ILEI

Karaj geamikoj,

Via IrEA brilas ekde jaroj. Pro la pandemio ĝia rolo enorme kreskis kaj nun neniu en la Movado povas imagi la virtualajn eventojn sen via efika kontribuo. Plie via Asocio arigas altnivelajn esperantistojn, kiuj povas esti modeloj por ni ĉiuj, ili vere estas ekzemplodonaj en siaj lingvokapabloj kaj movadaj aktivecoj. Eldonaĵoj, kursoj, kontaktoj en universitatoj, viaj agadoj elstaras. Pro tio ni volas gratuli vin kaj danki vin.

Tiaj bonaj kontribuoj el grava sed ne bone konata (de Eŭropanoj) mondoparto, kiu estas Okcidenta Azio, elstaras en la Movado, kie ofte la pezo restas en Eŭropo. Nia Movado riĉiĝus multe, se ni sukcesus, sukcesos, akcepti en ĝi homojn el la tuta mondo, pli da virinoj, pli da junuloj, pli da personoj kun kompreno de la ne justa lingva situacio nuntempa. Ni ĉiuj povas klopodi malfermi nin al la ekstera publiko de nia regiono.

Mi salutas kaj gratulas ĉiujn partoprenantojn de via Kongreso kaj deziras, ke ĝi estu fruktodona en interŝanĝoj de informoj, faktoj kaj analizoj.

Fartu bone ĉiuj !

Elkore salutas

Mireille Grosjean

Pluaj mesaĝoj aperos en la posta numero de «Irana Esperantisto» parte tradukitaj en la persa.

**Maŝajehi, spertinte
akademiajn mediojn
eksterlande, prezentis
praktikajn solvojn por
la enlandaj problemoj
– kaj eĉ li mem realigis
parton de ili!**



Prof. Alinagi Maŝajehi, serĉanta solvojn por niaj problemejoj

Alinagi Maŝajehi, profesoro pri administrado ĉe la Ŝarif Industria Univeraitato en Tehrano, Irano, naskiĝis en 1948 en urbo Ĥomejno, kies malnova nomo estis Kamareo kaj situas ĉ. 320 km sude de Tehrano.

Prof. Maŝajehi studis ĝis la naŭa klaso en lernejo kaj mezlernejo en Ĥomejno, poste pro lia interesiĝo al la matematika fako, por studi la lastajn tri jarojn de mezlernejo, li iris al Tehrano en 1946 kaj studis en Adib mezlernejo kaj diplomiĝis tie. Samjare li akceptiĝis en la Ŝarif Industria Universitato, unu el la plej renomaj kaj prestiĝaj universitatoj de Irano.

Maŝajehi licenciĝis pri la matematika fako kun la unua rango en la menciita universitato en 1970.

Li laboris por tri jaroj tie kiel edukada asistanto kaj ankaŭ fondis la laboratorion pri termodinamiko kaj varmotransigado laŭ la vidpunktoj kaj bezonoj de la tiutempaj profesoroj de la koncerna fakultato.

Li studis en la usona universitato MIT (Masaĉuseca Instituto de Teknologio) kaj fariĝis la prezidanto de la Irana Asocio pri Dinamiko de Sistemoj. Li kun helpoj de la iranaj Planada Organizaĵo kaj la Ministerio pri Industrioj fondis la Fakultaton pri Administrado en la Ŝarif Industria Universitato.

Maŝajehi en 1973 iris al Usono por studi en doktoriĝa programo pri administrado en la universitato MIT. Tie li doktoriĝis en 1978 kaj eklaboris kiel esplora asistanto. Post 7 monatoj li decidis reveni al Irano kaj eklabori en la Esfahan Industria Universitato, kie kun siaj kolegoj li fondis fakon pri la industria inĝenierado en 1979.

En la sama universitato, Maŝajehi kun kelkaj el siaj kolegoj en 1982 lanĉis por la unua fojo en Irano magistran programon pri inĝenierado de ekonomiaj kaj sociaj sistemoj. En 1986 li translokiĝis al la Ŝarif Industria Universitato en Tehrano, kaj jaron poste iris por unujara esplor-forpermeso kiel invitita profesoro al la Ŝtata Universitato de Novjorko en Albanio. Post reveno al Irano, li lanĉis programon por la ekvivalenta magistrado (vicmagistrado) pri la administrado de sistemoj en la

Industria Fakultato. Pli poste, tiu programo konvertiĝis al oficiala programo de magistrado pri la “administrado de sistemo kaj utiligado” en industria fako.

Maŝajehi lanĉis ankaŭ la Alt-Instituton pri Edukado kaj Esplorado pri Planado kaj Disvolviĝo, kiu poste transformiĝis al la Alt-Instituto pri Edukado kaj Esplorado pri Administrado kaj Planado, kaj laboris tie ekde 1989 ĝis 1995 kiel ĝia estro. La instituto inkluzivis esplorajn agadojn en la kampoj kiel: disvolviĝo, energio, transportado, administrado, kaj ekonomiko. Li en la instituto estigis ankaŭ la scienc-esploran revuon “Programo kaj Disvolviĝo”.

Maŝajehi en 2007 nomumiĝis kiel ĝenerala direktoro de la Petrokemia Kompanio Rahbaran. Antaŭ tio, li estis membro de direktora estraro de Kompanio Kejson.

Li ankaŭ instruis studobjektojn, kiel: administradaj principoj, kontado, buĝetado kaj kontrolado, strategia administrado, dinamiko de ekonomiaj kaj sociaj sistemoj, industria dinamiko kaj lernantaj organizaĵoj.

Liaj kredoj pri bedaŭrinda allogiĝo de iranaj studentoj nur al certaj fakoj

Prof. Maŝajehi iam diris, ke:

“... Pro sociaj, historiaj kaj politikaj kialoj, la plej altaj talentuloj de la lando allogiĝas al teknikaj, inĝenieraj aŭ medicinaj kampoj. Ekzemple, la unua-ranguloj de la enir-konkurso por universitatoj kutime elektas inĝenierajn fakojn. Komprenoble, ĉi tio ne signifas, ke tiuj kun pli malaltaj rangoj estas malpli talentaj; mi volas diri, ke laŭ la kriterio de la (universitata) enir-konkurso, la plej altaj ranguloj emas al teknikaj, inĝenieraj, arkitekturaj kaj similaj kampoj. Ĉi tia fak-elektado (fare de studentoj) ne okazas nur hodiaŭ kaj hieraŭ, sed havas longan historian precedencon malantaŭ si. Ankaŭ la disciplinoj pri administrado kaj ekonomio estas kompleksaj kaj, laŭ siaj enhavoj, postulas tiujn (studentojn), kiuj havas altajn talentojn kaj koherajn kaj serĉemajn mensojn. Iam, niaj studoj montris, ke se ni volas altiri la talentulojn de la lando al ĉi tiuj kampoj, ĉi tiuj du fakoj devas esti kreitaj en teknikaj kaj inĝenieraj universitatoj...”¹

Fakte sekve de la lastfrazo dirita kredo de li, li estigis Fakultaton pri Ekonomiko ene de la Ŝarif Industria Universitato, kiu ankoraŭ hodiaŭ havas kontraŭulojn! Tamen en la intervjuo, el kiu tiu ĉi parto citiĝis supre, li diris ke en 29 el 30 plej bonaj inĝenieraj universitatoj de la mondo, oni instruas ankaŭ ĉiujn fakojn de administrado.

Liaj kredoj pri ne-inda loko de la homaj kaj sociaj sciencoj en Irano

Dum interesa intervjuo kun irana fak-asocio, kies titolo estas “La kreskado de ĉiu socio eblas per kreskado de la homaj kaj sociaj sciencoj”, prof. Maŝajehi i.a. diris, ke:

“... La kampoj de homaj kaj sociaj sciencoj ne trovis sian (indan) lokon en nia socio, do eble nia politika historio kaŭzis ĉi tion. Ĉiuj socioj, kiuj (bone) kreskis kaj disvolviĝis, fakte iliaj homaj kaj sociaj sciencoj kreskis por doni la bazon por la kreskigado de aliaj fakoj. Se nia ekonomio ne estas taŭge administrata, la mastrumado de fakoj kaj entreprenoj ne estas taŭge administrata, tiam la produktiva laboro de specialigitaj personoj ne estos ebla. Rezulte, (ankaŭ) niaj bonaj inĝenieroj elmigras kaj foriras (el Irano), ĉar ili ne havas laboron ĉi tie. Se la administrado de la (homaj) sciencoj ne plenumiĝos bone en organizaĵoj, ĉi tiuj sciencoj kaj ĝiaj (instruantaj) posedantoj fosiliĝos ...”²

1- <http://hosseinnaseri.com/view/EN/31094.aspx>

2- <https://bit.ly/2PGWyON>

Parto de liaj sciencaj kaj plenumaj agadoj

- 1- Prezidanto de la Irana Asocio pri Dinamiko de Sistemoj, 2017
- 2- Membro de la Supera Administra Konsilio, 2017
- 3- Membro de la Fondintaro de la Irana Alt-Lernejo pri Administrado, 2008 ĝis nun.
- 4- Fondinto kaj prezidanto de la Internacia Administrada Konfrencio en Irano, 2003-2018
- 5- Profesoro ĉe la Ŝarif Industria Universitato, 1997-2011
- 6- Estrarano de la Kompanio Kejson, 2006-2011
- 7- Ĝenerala Sekretario de la Asocio de Eksstudentoj de la Ŝarifa Industria Universitato, 2002-2011
- 8- Fondinto kaj estro de la Fakultato pri Administrado kaj Ekonomio de la Ŝarifa Industria Universitato, 1999-2003
- 9- Membro de Direktora Estraro de la Industria Administrada Organizaĵo, 1987-1999
- 10- Konsilisto de Kompanio "High Performance Systems McKinsey" en Usono, 1996-1998
- 11- Estro kaj fondinto de la Supera Esplorada Instituto pri Planado kaj Disvolviĝo, 1989-1995
- 12- Konsilisto de la Ministro pri la Energio pri planadaj aferoj, 1985
- 13- Konsilisto de la Ministro de la Pezaj Industrioj pri la planadaj kaj programaj aferoj, 1984
- 14- Konsilisto de la Ministro pri Loĝado pri planadaj aferoj, 1983
- 15- Estro de la Fakultato pri Industrioj de la Esfahan Industria Universitato, 1983-1985
- 16- Konsilisto de la Programa kaj Buĝeta Organizaĵo, 1980-1983
- 17- Asistanto pri financo kaj administrado en la Esfahan Industria Universitato, 1978
- 18- Grupestro de la Inĝenierado de Industrioj en la Fakultato pri Teknologiaj kaj Sociaj Sistemoj en la Esfahan Industria Universitato, 1979

Kelkaj perslingvaj libroj verkitaj de prof. Maŝajehi

- 1- Dinamiko de Sistemoj - Sistema Perspektivo, eldonejo Arjana Galam, 2017
- 2- Disvolvado de Lerno-Kapacito, Defio de Administrantoj kaj Gvidantoj, kun Mostafa Haŝemi-Taba, Eldonejo Dastan 2010
- 3- Industria Disvolviĝo, Kontadaj Prezroj, kaj Aktuala Inflacio, Eldonejo de Organizaĵo pri Industria Administrado. 1995
- 4- Perspektivo pri Irana Ekonomia Disvolviĝo surbaze de Petrolo, Centro de Unniversitata Eldonado. 1984

Fontoj:

Krom tiuj menciitaj en la artikolo:

<https://bit.ly/3eSSu6K>

Enesperantigis: Behĝat Mamduhi

Okaze de la 80-a naskiĝ-datreveno de kara profesoro Renato Corsetti, IrEA okazigis retan fest-kunvenon okaze de kiu d-ro Sayadpour, la prezidanto de IrEA, verkis kaj prezentis la suban poemon al Renasto.

Vi estas Renato Corsetti!


Verkis: d-ro Keyhan Sayadpour

Renatus estas antaŭnomo de latina origino, kiu signifas "renaskita" (natus = naskita). En la itala, portugala kaj hispana ĝi ekzistas en viraj kaj virinaj formoj: Renato kaj Renata. ... La nomo havas spiritalan signifon, t.e., esti naskita denove kun bapto, t.e., de akvo kaj la Sankta Spirito.

La familia nomo Corsetti estas por homo, kiu kutime deziras bonan tagon al ĉiuj, aŭ kiu estas gaja kaj ĝojiga homo.

Kiu vi estas?

***Vi estas Renato,
Vi estas renaskita,
Renaskita Zamenhof,
Renaskita Privat,
Renaskita Lapenna,
Renaskita Sekelj,
Estro de Esperanto-movado,
Instigo por agado,
Vi estas Corsetti,
Deziranta bonan tagon,
Bonan epokon,
Finan venkon,
Al ĉiuj esperantistoj,
Al ĉiuj mondanoj,
Vi gajigas esperantistojn,
Vi donas energion,
Inspiron, entuziasmon,
motivon, helpon,
Vi estas Renato Corsetti!***



Jen poemo de Henri George (1879-1952), kiu loĝis en Tournais, Belga urbo apud Francujo, kaj kie la popolo parolis tradicie la «pikardan» lingvon.

Tiu ĉi poemo eble estas la plej bela en la pikardlingva literaturo, kiun oni tro ofte rigardas kiel reduktita al komikaĵoj lokaj; ĝi indus fakte esti enigita en klasikaĵojn pro la talento kaj emocipovo, kun kiu ĝi traktas malĝojan kaj universalan temon. Memoru parkere almenaŭ la lastan strofon kiel citaĵon: ĝi estas tiom bela kaj korpema! (Eble tiu belo ne sentebas en la Esperanta traduko, sed en la originalo mi certigas vin, ke jes!) Por kompreni la cirkonstancojn de la sceno: En multaj regionoj kaj urboj de Eŭropo (ne ĉie! En la urbo kie mi loĝas tio tute ne ekzistas), la lastan tagon antaŭ la religia kristana fasto (Karesmo) estas granda kaj intensa popola festo, nomata Karnavalo. Tio estas ligita kun multe de tradicioj, ofte malsamaj laŭ la regionoj. Necesus tutan artikolon por klarigi tion. Mondskale estas ĉefe konataj la Karnavalo de Venezio en Italio, kaj en Brazilo tiu de Rio de Ĵanejro, sed ili tute ne elĉerpas la temon, tute ne! Estus granda eraro kredi tion. (Kaj multaj aliaj karnavalaj urboj ekzistas: Binche en Belgio, Dunkirko en Francio, Bazelo en Svislando, Baranquilla en Kolombio, ktp.)

En kelkaj lokoj anstataŭ festi tiel ANTAŬ la fastotempo, oni festas en la tago meze de tiu periodo, kiam oni do haltigas la fastadon. Tial oni tiam nomas la feston Karesmomezo.

Do la poeto tie parolas pri tia festo, kaj en la urbo pri kiu li parolas oni okazigas marŝadon de junuloj kaj junulinoj alivestitaj en personojn nomitaj pierotoj kaj pierotinoj (vidu la bildon sube).

Pierotinoj kaj Pierotoj

Karesmomezon. Ene la stratoj
estis muzikoj, homoj maskataj.
Antaŭ la halo, homamasegoj
irantaran trapasadon ĝenis.
Impresas tiu! Unuaj fronte,
pli ol cento, kalikovestitaj:
tiom da Piĉjoj, kiom da Pinjoj,
tiom da Pinjoj, kiom da Piĉjoj

Alia poste 'stis maskerado.
Plie, tie-ĉi fordeflankiĝis
du pierotoj de l' kamaradoj:
Piĉjo en ĉi lok', Pinjo en tiu.
Malproksim' ne pli ol kelkaj metroj.
Sed geamantoj estas simpluloj;
maltrankviliĝas Pinĉjo ne vidi
Pinjon, kaj Pinjo ne vidi Pinĉjon.

Povra Pinjo estas plorema:
ŝi hejmen kurus ja senprokraste!
Kaj Piĉjo afliktiĝas tutheziteme,
li vagas kiel 'stus frenezulo.
Ja trista festo estas por ambaŭ;



dum ĉiuj aliaj uloj festas
ili kontraste ekĉagreniĝas
tie-ĉi Piĉjo serĉante Pinjon
kaj tie Pinjo serĉante Piĉjon.

Tempe mi sekvis la irantaron,
kaj mi deziris la retroviĝon
de l' du: veinde atendo vana!
Mi vidis iun, poste l' alian,
ambaŭ neniam; tiam en balon
mi ekeniris pensante: baldaŭ
povas esti ke, ja retroviĝos.
Sed sur benk' Piĉjo atendis Pinjon,
kaj milde Pinjo atendis Piĉjon.

Horojn daŭrantajn, dum muzikiĝas
- tio-ĉi daŭras ĝis ektagiĝo -
ili restadis kiel statuoj,
poste irante, laŭ siaj vojoj.
Mi vidis ilin, kiuj foriris,
Piĉjo kapkline, Pinjo plorante
Kaj dum ĉi tempo gaje dancadis
Pinĉjoj l' aliaj kun siaj Pinjoj.

Ve ! En la vivo 'stas ofte same,
vi restas fraŭlo, aŭ vi fraŭlino,
kaj tio estas pli malbonege
ol je laetare*: mallonga estas
la karnavalo, longas la vivo ...
Vi tro timema, aŭ tro fiera,
familio tro bonedukita,
aŭ 'stas stulta, kialo ne gravas!
Maljuna Piĉjo sopiras Pinjon
velkinta Pinjo sopiras Piĉjon.

Tio daŭras jarojn, kiam oni
renkontiĝas, oni salutas sin.
Vole nevole 'stas la destino!
Okaze, oni ne plu rekonas,
submetiĝas, sed ĉiam bedaŭras,
kiam troas la sufer', ni diras:
Kiom feliĉa mi 'stus kun Pinjo!
Feliĉa 'stus mi, se havus Piĉjon!»



Kiam iam pasas funebrantaro,
sonoriĝadas por entombigo,
L' oldo, l' oldino mallaŭte diras:
«Unu pli, kiu montras la vojon.»
«Kiun viron ni do entombigas?»
«Kiun oni enterigas inon?»
Oni interflustras «'stas ĉi-tiu».
Diradas Piĉjo en si: «'stas Pinjo!».
Aŭ pensas en si Pinjo: «'stas Piĉjo!».

Jes aŭskultis vi tristan rakonton.
Samajn rakontojn vi konas ĉu ne?
Ĉar multas ili, vi ja min kredu!
Eble, vi propre spertis mem tion.
Eble murmure kaŝe diras vi,
kion sed laŭte al vi diras mi:
«Ha! Povra Piĉjo sen sia Pinjo!
Ha! Povra Pinjo sen sia Piĉjo!».

* laetare, latina vorto «estu feliĉaj», popola malnova festo disiganta du kristanajn eventojn.

Veturoj kaj memoraĵoj!!(2)

Verkis: Nazi Solat



Jam venis momento de eliro el Litovio kaj reveni al Rusio, sed ĉi-foje trajne tra Sankt-Peterburgo. Alia nevidita mia amikino (Irina) rete aprobis helpi nin trovi tranoktejon dum nia restado en Sankt-Peterburgo. Sed kiam mi estis en Vilno, ŝi ne respondis al miaj kontaktoj kaj rezulte ni ne estis certaj ĉu ni povus uzi ŝian helpon aŭ ne!

Ĉiaokaze ni survojaĝis dum ĉiuj geamikoj miaj avertis nin ke pasi tra Belorusio¹ povus esti tre riska ĉar survojaj oficiroj estas ege akurataj kaj ili eventuale arestos nin! Mi forgesis mencii ke survoje, en la placo de la urbo, hazarde mi renkontis mian amikon kiun mi perdis lastnokte surstrate. Li akompanis nin ĝis la stacidomo.

Tio estis nia alia ŝanco ĉar elektra ŝtuparo ne

funkciis kaj se li ne helpis nin, eventuale ni maltrafus nian tranjon; komence pene ni enpaŝis trajnon haltintan en stacidomo sur kiu estis skribita “Sankt-Peterburgo”! Sed post kiam ni pene kunportis niajn valizojn, la deĵoranto eksciinte pri ni, eliris el sia loko kaj avertis nin ke ni jam eraris kaj devas ŝanĝi nian linion!! Tiu simpla eraro signifis ke ni devis malsupreniri kaj denove supreniri la ŝtuparon de alia flanko, kiam la ĝusta tempo de ekveturo de trajno jam estis pasinta!

Denove kaj bonŝance ĝi ekis prokraston preskaŭ 15 minutojn!

Atinginte la trajnon, alifoj alia deĵoranto informis nin ke ni devus antaŭ eniro en trajnon, devas iri al inspekt-parto kiu situis ĝuste en la fino de la linio

1 - Belorusio estas senhavena lando en Orienta Eŭropo, limanta al Rusujo, Ukrainio, Pollando, Litovio kaj Latvio. Ĝia ĉefurbo estas Minsko.

Dum la plej granda parto de historio, tio, kio nun estas konata kiel Belorusio, estis parto de aliaj teritorioj, inkluzive de la Duklando Polatsk, Granda Duklando Litovio, Komunumo de Pollando-Litovio kaj Rusa Imperio. Finfine en 1922 ĝi fariĝis respubliko en Sovetunio sub la nomo Belorusa SSR.

Ĝi oficiale deklaris sian sendependecon kiel Belorusio la 25-an de aŭgusto 1991, post la kolapso de Sovetunio.

kaj ankaŭ ni devis kunporti niajn valizojn tie!!

Ah!! Ne kredeble! Mi vere estis elĉerpita post tiom da paŝadoj kune kun pezaj valizoj kaj vere ne havis energion alifoje kunporti tiujn valizojn ĝis la fino de linio. Mi komprenigis kaj akceptigis la deĵoranton permesi nin senvalize iri tien ĉe la inspektoron. Li per sia sendrata telefono por ricevi permeson, bonŝance fine akceptis!!

Finfine ni estis en la ĝusta trajno sur la ĝusta vojo al Sankt-Peterburgo! Oni gvidis nin al iu kvaropa kupeo kie gejunuloj dormintis aparte en siaj lokoj. La forta junulo helpis nin meti la pezan valizon de mia amikino supren kaj finfine ni daŭrigis nian veturon.

En la trajno oni devis aĉeti kontraŭ rublo. Ni havis malmulton kiu sufiĉis por akvo, nur!! Do ni rezignis aĉeti surfolion. Sed tiu junulo afabla foriris de kupeo kaj reveninte kunportis du pakajojn enhavantajn purajn surfoliojn! Li tuj eliris kupeon kaj ne revenis dum tiu nokto, eble pro tio ke ni virinoj restu komfortaj dum la nokto!

Ĝus tiam kiam mi trovis okazon, klopodis iel komprenigi lin ke mi deziras pagi la kotizon al li, sed li tute ne akceptis.

Post trifoja kontrolado de niaj pasportoj ni sukcesis pasi la limon!

Intertempe mi kelkfoje klopodis telefoni mian amikino, sed malsukcesis ĉar en la kupeo ne estis reto atingebla.

Finfine je la oka horo matene, la valorega reto fariĝis atingebla kaj mi aŭdis voĉon de iu virino. Mi malkovoris ke ŝi estis Irina, alia jam ne vidita amikino kiu hazarde aŭdis la telefon-sonon, ĉar ŝia filo, kiel kutime, mutigis telefonon dum nokto pro tio ke ŝi dormu pli komforte.

Ŝi demandis min pri nia alven-stacidomo. Ŝi afable intencis alveni kaj akompani nin. Mi ne sciis pri nia alven-punkto kaj denove petis helpon de la junulo en nia kupeo. Ĉi tio estis ĝusta decido ĉar ŝi intencis iri alian stacidomon!

Eltrajniĝinte tiu junulo helpis nin elporti pezajn valizojn.

Ĝus elirante de la trajno ni renkontis Irina-n kaj ŝian filon Saŝa.

Intertempe ili petis sian amikon Vladimir kiu fakte estis kliento de Saŝa por veni al stacidomo per sia

aŭto. Li afable akceptis kaj akompanis ilin kaj poste nin. Li estis maljuna viro kaj konsentis ke ni unue iri al lia loĝejo kaj poste translokiĝi alien.

Survoje kiam ni iris al iu vendejo por aĉeti kelkajn aĵojn por nia maten-manĝo, tiu amiko alvokis kaj diris al Irina ke ni povos tranoki en lia loĝejo, ĉar unue li supozis ke ni estis islamanoj kiuj surmetas vualon, kaj ne deziris permesi nin resti ĉe lia loĝejo! Sed ekvidinte ke ni havis normalajn vestaĵojn, proponis nin tranokti ĉe lia loĝejo kontraŭ tre akceptebla kotizo!

Ni ege gajiĝis ne sciinte ke tiu bona kotizo inkluzivis niajn veturadojn al vidindaĵoj de Sankt-peterburgo, ĉirkaŭaj urbetoj, trifojaĵoj kaj interreton. Lia loĝejo estis ege luksa. Lia edzino estis ege afabla kaj helpema. Nokte ni konatiĝis kun ilia knabino, Lisa!

Ni gajege ripozis en la luksa tranoktejo nia.

Lia edzino deĵoris ie kaj frumatene foriradis por atingi sian laborejon, sed ĉiutage preparadis maten-manĝon por ni antaŭ foriro! Poste Vladimir kunportadis nin kune kun Irina kaj Saŝa por viziti iun vidindaĵon. Mi ne povas preterpasi kaj ne menciis bongustajn manĝaĵojn kiujn la afabla edzino kuiris por ni ĉiutage! Laŭ konfeso de Vladimir, ŝi miksis sian bonhumoron kun krudaj materialoj, ĉar li mem per samaj materialoj ne sukcesis prepari la samon tiel bonguste!!

Ni atingis Sankt-peterburgon dimanĉe kiam estis feria tago. Lunde, la tria tago de nia reveno al Rusio, ni klopodis registriĝi. Do mi kontaktis la numeron donitan al ni por registrĝi, sed estis vane!! Mi kontaktis Tehranon petante helpon. Ili donis nin alian numeron. Sed denove nia klopodo sen rezulto estis. Tamen ili proponis nin revenonte al Moskvo kontakti ilin por trovi solvon.

La edzino de Vladimir nokte kontaktis kelkajn referencojn por helpi trovi solvon kaj fine diris nin "vi devas post tri labor-tagoj registriĝi, sed merkrede kiu estas la tria tago, vi forlasos ĉi tien kaj ĵaude atingos Moskvon! Do tie vi povos plenumi aferon senprobleme". Intertempe ni aŭdis pri «Migra Karto» kiun oni disdonis ĉiujn elirintojn de aviadilo!! Kaj ni komprenis ke ni devis prizorgi ĝin same kiel niajn okulojn, sed ne agis tiel kaj eĉ ne sciis kie kuŝis ĝin tiam!!!

Ni traserĉis ĉiujn niajn kunportaĵojn kaj finfine trovis ĝin inter niaj paperfolioj!

Ĉiaokaze ni trajne veturis al Moskvo kaj reklamis niajn alvenojn al nia amikino Lana pri nia alven-horo.

Lana en stacidomo atendis kaj anoncis nin ĉar alia gasto tranoktis en ŝia hejmo, ni ne povis resti ĉe ŝi kaj ni devus tranokti alien. Ŝi mem klopodis trovi hotelon por ni, sed nur pri unu hotelo ŝi sukcesis atingi aprobon! Plejmulto de hoteloj ne akceptis eksterlandajn gastojn kaj tiuj kiuj akceptis, sciinte ke ni estis irananoj, rezignis!

Fine ni kune kun Lana iris al la hotelo kiu povus nin akcepti. La respondeculino ekvidinte niajn pasportojn diris pro tio ke ni jam ne estis registritaj, ŝi ne povos akcepti nin kaj ni devus iri ĉe polico! Intertempe mi klopodis kontakti tiun numeron kiun donis nia agentejo por solvi nian eventualan problemon pri registrado, sed estis vane!!

Lana klopodis konvinki virinon, eĉ per subaĉeto (per kaŝa skribo al ŝi), sed ankoraŭfoje malsukcesa estis ŝia klopodo. Mi mem serioze estis kontraŭ subaĉeto, eĉ timis!! Fine post perdi longan tempon ni kune kun Lana iris al policejo. Malpuran, turbulentan kaj sufiĉe akran medion ni trovis. Ni kelkfoje estis ĵetitaj al diversaj ĉambroj kaj deĵorantoj.

Kara Lana multe debatis ilin eĉ koleriĝis kaj fariĝis ruĝega. Feliĉe en la fino ni trafis al ĝusta respondeculino kiu diris al Lana «kiu adresis vin ĉi tie? Neniu rajtas postuli vin pagi monon.»

Poste montrinte siajn fingrojn kalkulis tagojn kaj aprobis ke ni ne faris ion malĝustan kaj ĝuste dum sama punkto ni devas registriĝi. Ŝi diris nin “nepre diru al respondeculino de la hotelo rigardi koncernan ĉapitron en la leĝar-libro kaj ŝi mem komprenos la aferon.” Ni petis policinon skribi la numeron de la ĉapitro sur papereto kaj doni ĝin al ni. Ŝi facile faris tion kaj donis nin la bezonotan detalon.

Ni iomete pli komforte enspiris kaj post ripozo kaj manĝi ion ĉe manĝejo, ĉar estis preskaŭ tagmezo kaj ni ekde pasinta punkto manĝis nenion, poste iris al la hotelo, sed survoje ni decidis iri alian hotelon, ĉar fakte ni ne deziris resti en tiu aĉa hotelo kun tia respondeculino!

Denove ni havis saman debaton kun du aliaj virinoj. Sed ĉi-foje ni havis tiun gvidon kiun la policino havigis nin; la koncernan numeron de la regulo.

Unu el du deĵorantoj kiu estis pli afabla, prenis grandegan leĝar-libron kaj trovis tiun regulon kaj konvinkiĝis ke ni pravas. Samtempe ŝi telefonis al alia persono kaj rakontinte la aferon konvenkigis tiun ankaŭ! Post perkape komprenigis sian kolegon paroli kun la persono sur linio, ĉar ŝi ankoraŭ daŭrigis sian debaton kun ni.

Fine ĉiuj konvenkiĝis. Ni rezervis ĉambron por 15 minutoj kondiĉe ke se ni ne revenus post 15 minutoj, ili rajtus rezervi ĝin por aliulo. Ni revenis al la unua hotelo kiu post negocoj permesis nin meti niajn pezajn valizojn tie! Ĉi-foje ni intencis preni niajn aĵojn.

Ŝi ankoraŭfoje insistis siajn vidpunktojn kaj eĉ ne ĵetis rigardeton al la noto de policano!! Mi diris al Lana nepre adresi mian vidpunkton al ŝi pri tio ke ŝi ne meritas ŝian postenon ĉar ŝi nek havis sufiĉajn informojn, nek pretis ekscii pri ĝi!

Ĉiaokaze ĉi tiu problemo finiĝis kaj ni mendis ĉambron en la hotelo por tri tagoj sed la afabla deĵorantino de la hotelo preninte niajn biletojn, registris nin ĝis la fino de nia ĉeesto en Rusio senrigarde kie ni restus! Do ĝis fino de nia ĉeesto en Rusio ni ne havis problemon pri registrado aĉa! (Ofte en turbulenta medio en ĉi tiaj sistemoj, oni povus trovi solvojn de problemoj imune pere de pli afablaj, helpemaj homoj!)

Post tri tagoj kiam la loĝejo de Lana malpleniĝis, pro insisto de Lana, ni iris al loĝejo ŝia.

